„Mutig vorwärts!“ „Kuraĝe antaŭen!“

Aŭstria Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Delegitaro kaj Esperanto-Delegitaro de Wien.

5a jaro. No. 5 Monata Majo 1928

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. S 4.80, germanlandanoj RM 3.25, alilandanoj sv. fr. 4.25; ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Schwedische Parlamentarier lernen Esperanto. Schwedische Parlamentarier lernen in einem eigenen Kurse Esperanto. Anreger ist der Bürgermeister von Stockholm Lindhagen, Mitglied des Parlaments, der Esperantist ist und seit Jahren im Riksdag für Esperanto eintritt.

Intern. Zeitungsschau und Esperanto.

In Sarajevo wurde am 25. 3. eine Intern. Zeitungs-Ausstellung eröffnet. Interessant ist, daß das ganze Material (3000 Zeitungen aus 45 Ländern) einzig vermittels Esperanto gesammelt wurde. Die Esp.-Gruppe „La Stelo Bosna“ leistete werktätigste Hilfe.

Das Ministerium für Volksaufklärung in Estland gibt schon das dritte Jahr Geldzuwendungen an die Estländische Esperanto-Zeitung.

Esperanto-Haus.

In Schumen (Bulgarien) hat die Gemeinde der dortigen Esperanto-Gruppe einen Baugrund für ein eigenes Esperanto-Haus gegeben.

Radio-Programm der Esperantosendungen mit genauer Zeitangabe veröffentlicht „Esperanto“-Genf im Aprilhefte und „Heroldo de E.“ in Nr. 16. J. Jungfer, Lindenstr. 10, Lübben, N-L, Deutschland, erbittet Berichtigungen und Vervollständigungen hiezu.

Der **„Esperanto-Weltbund“** in Genf, mit Delegierten in mehr als 1700 Orten von 70 Ländern, feiert während der Tagung des 20. Intern. Esperanto-Weltkongresses in Antwerpen (Aug. 1928) das Jubelfest seines zwanzigjährigen Bestandes.

Einiges aus Leipzig.

Die größte int. Messe, die Leipziger, macht in großem Stile durch Esperanto Fremdenverkehrswerbung für den Besuch der Messe. Seit Jahren sendet sie nach 55 Ländern Nachrichten in Esperanto, die von den Esperantisten in den Landeszeitungen in der Landessprache veröffentlicht werden.

Das Messeamt hat eine eigene Esp.-Abteilung unter Leitung des Prof. Dr. Dietterle, Direktor des Esperanto-Institutes für das Deutsche Reich (staatliche Einrichtung).

Esperanto sprechende Polizeibeamte bilden eine eigene Gruppe. Polizeipräsident Fleissner fördert Esperanto besonders.

Die weltbekannte Verlagsfirma Ferd. Hirt & Sohn hat eine eigene Esp.-Abteilung und ist heute der größte Verleger von Esperanto-Literatur.

Die Radiostation (Direktor Frauendorf) gibt täglich ihre Wetterberichte in Deutsch und Esperanto und sendet bereitwillig Nachrichten über Begebenheiten aus der Esperanto-Bewegung, die in Leipzig und ganz Sachsen sehr rege ist.

In Leipzig leben die bekannten Esperantisten Bennemann, Degen, Prof. Dietterle, Kötz, Dr. Lippmann, Streidt.

Leset die uns günstige Tages-Presse!

„Linzer Volksblatt“ bringt allwöchentlich in seiner Esperanto-Ecke Interessantes und erwähnt stets „Aŭstria Esperantisto“, die jedermann gern gegen Rückporto kostenlos Auskunft gibt und eine Probenummer zusendet.

„Illustrierte Kronenzeitung“ vom 25. April brachte das Bild des Esp.-Kurses bei der n.-ö. Gendarmerie in Wien.

„Oberösterr. Tageszeitung“ in Linz brachte einen schönen Artikel „Theorie und Praxis im Esperanto“ von Buchleitner, Waldzell, und „Weltsprachen“ von U. (Ulbrich-Linz);

„Tagespost“ in Linz einige kleine Notizen.

Wäre es nicht möglich, daß auch diese unsere Zeitung mit Adressenangabe erwähnen?

U. E. A. jubileas.

Dum la XX-a en Antverpeno la delegitoj kaj anoj de U. E. A. festos la dudekjarecon de ĉi tiu por la praktika uzado de E. grava entrepreno.

Hector Hodler ĝin fondis en printempo 1908 kaj Th. Rousseau estis lia fidela konsilanto.

Grava krizo en 1907 minacis nian E.-movadon. Ekstera komitato imagis, ke ĝi povas tuŝi E.-on kvazaŭ ludilon, kaj pluraj samideanoj, antaŭe tre konservemaj, subite simpatiis kun tia aventuro. Aliaj reagis per akraj polemikoj.

Hodler intervenis montrante novan vojon: „Lasu diskutojn, lasu teorion; E. estas lingvo, ne propono; uzu ĝin, utiligu ĝin; helpu, ke ĝi vivu per servado kaj serioza praktikado. Tiam la leĝoj mem de l' uzado kaj vivado alportos al ĝi la necesan pliriĉigadon kaj ĉiutagan progresigon tute nature kaj senrompe, kiel d-ro Zamenhof ĝin antaŭvidis, kiel okazas al ĉiuj ceteraj lingvoj. Ĉar la bazo estas simpla, regula kaj klara, vi ne bezonas timi, ke la uzado ĝin malsimpligos. Ĝi nur kuros sur la reloj."

Tiel fondiĝis U. E. A. por savi esp.-ismon el „Komitataj decidoj" kaj reformistaj aventuroj. Pro tio ĝi enhavas en la statuto jenan paragrafon: „La oficiala Lingvo de U. E. A. estas la Zamenhofa Lingvo Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per sia literaturo kaj teknika verkaro."

El la nuboj ili venigis surteren la „internan ideon" kaj organizis la esp.-istojn al reciproka helpado kaj servado trans la landlimoj.

Tial U. E. A. laŭ la statutoj celas: „Disvastigi la uzadon de la int. helplingvo Esperanto;

Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo;

Krei int. servojn uzeblaj de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio;

Kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj."

Prave d-ro Zamenhof diris, ke U. E. A. estas la plej grava institucio en nia neŭtrala movado.

(Laŭ artikolo de d-ro Privat.)

•

Ni atentigas niajn legantojn, ke ili fariĝu delegitoj kaj membroj de U. E. A. Informu vin ĉe s-ro Bernfeld, teritorio sekr., Wien, II., Czerninplatz 5.

III a Raporto de „Intern. Esp.-Muzeo en Wien".

I., Liebiggasse 5.

A. Propagando:

1. Hungarlanda E.-Societo kaj Hungara Laborista Ligo E. promesis subtenon.

2. Raportis: Arbeiter - Esperantist, Sennaciulo, Marto, Hungara Heroldo, The British Eperantist, La Movado (longa art.), Konkordo (longa art.), Pola Esperantisto, L' Esperanto.

3. Naciaj gazetoj: „Tilburgsch Dagblad" — Tilburg (longa art.); „Pax" — Genève; „Aftonbladet" — Stockholm; „Slovenska Dennik" — Bratislava; „Reichspost", „Volkszeitung", „Kleine Volkszeitung", „Tagblatt", „Ill. Kronenzeitung" — Wien; „Kärntner Tagespost"; „Arbeiterzeitung" — Wien (en „Raporto pri Plenkunsido de ALLE.")

B. Materialo ricevita:

Laŭ donaclistoj n-roj:

9 u. 18 E.-Klubo — Č. Budějovice;
10 J. Thiebault — Carignan;
11 A. Vonlanthen — Bern;
12 L. Kutscher — Kraków;
13 M. Janik — Hajduki Wielki;
14 E. Tabakkontraŭula A. — Wien;
15 Hungara Laborista E.-A. — Budapest;
16 T. J. Guéritte — Surbiton (Anglujo);
17 A. J. Petrov — Novosibirsk (Siberio).

C. Mono alveninta:

E.-Klubo — Česke Budějovice Ŝ. 20.56.

Subtenantoj: Pojare 25 Dinar: Wranka Dragutin — Osijek (SHS); 1 sv. fr. Kurt Schönrich — Wiesbaden; Š. 1. - K. Luegmayer, d-ro M. Altrichter, Marie Müllner, R. Einfeldt — Korneuburg; dir. Schöpfer — Voitsberg; ĝend. ofic. F. Rasch — Purkersdorf; B. Selzer, majoro Sinner, A. Klein — Wien; H. Jungschaffer — Ried.

Ĉ. Korespondo:

A. J. Petrov, Novosibirsk, Siberio: 25. IV. 28. „Mi hodiaŭ sendis por muzeo kelke da materialo el Siberiaj esp. presaĵoj. Estonte mi sendos ĉiujn eldonaĵojn."

D. Novaĵoj.

El „Int. Kuratora Komitato" nia Zwach mortis.

Eniris por Jugoslavujo d-ro Duŝan Maruzzi, prez. de Sudslava Esp.-Ligo.

Por LKK.: Steiner, prez.; Smital, sekr.

Esperantista Akademio.

Jen la rezultato de la Elektoj en L. K.:

Nombro de la L. K-anoj: 126
Voĉdonis 92

Estas elektitaj:

S-roj	Muĉnik	89	voĉoj
	Sabadell	88	„
	Drezen	87	„
	Bofill M. Granada .	86	„
	Ghez	85	„
	de Menil	84	„
†	Zwach	83	„
	Uitterdijk	81	„
	Sepúlveda Cuadra .	78	„

Je nia granda bedaŭro S-ro Zwach mortis dum la balotado. Lia nomo tamen staros en nia Jarlibro 1928.

Akademiaj Decidoj.

La Akademio, fidela al la Zamenhofa sistemo por landnomoj kaj forigante ĉian alian solvon, decidis per 15 voĉoj kontraŭ 2 (Febr. 1928), ke la solaj landnomoj, kiujn ĝi povas aprobi estas tiuj nome montritaj en la verketo Pri Landnomoj, la sistemo de D-ro Zamenhof.

Ĝi aliparte opiniis, ke la § 15 de la Fundamenta Gramatiko ne estas tie ĉi aplikebla, kaj ĝi decidis, ke la rimarko (1) de l' Vortaro de la Oficialaj Radikoj (p. 31) kaj de Klasika Libro (p. 119), kiu estis nur komentaria noto de l' Prezidanto, estas nuligota.

Malprave oni riproĉas la Akademion, ke ĝi estas tro konservema, ke ĝi nenion faris.

Tro konservema! sed kial do, se oni deziras esplorojn pri difinitaj lingvaj demandoj, pri ia ŝanĝo en nia Regularo, oni ne uzas lojale la rimedojn montritajn en la §§ 15 kaj 23 de ĉi tiu Regularo?

Ĝi nenion faris! Ĉu nenio: la longa laboro de la **Korektoj de la eraraj tradukoj en U. V.**, la **Aldonoj**, la **Vortaro de la Oficialaj Radikoj**, la eldonado de **Klasika Libro** en 6 lingvoj (la tradukoj en 4 aliaj lingvoj estas pretaj, nur **mono mankas**); ĉu nenio, la grava, multnombra, privata korespondado prilingva de kelkaj Akademianoj, kaj la jaraj Raportoj? Prof. Grosjean-Maupin preparas nun novan Aldonon al nia Vortaro!

Trankvile, senbrue ĝi efektive laboras kaj ne meritas la riproĉon pri nelaboremo, ĉar ĝi rifuzas preni sur sin taskon, kiu ne, nepre ne, estas la ĝia: plirapidigi la evoluon de la lingvo!

Sen ia ajn kompensaĵo, sen rekompenco la Akademianoj donacas al Esperanto la tempon, kiun lasas al ili libera, iliaj profesiaj okupoj: pagata estas neniu el ili. Mi ne insistas.

La Jarlibro 1928 aperos tuj post la elektoj.

Ni trankvile, senŝanceliĝe iru nian rektan vojon: per disciplino, per unueco ni venkos ĉiujn momentajn malfacilaĵojn.

Via tre fidela

Th. Cart.

VIII-a Aŭstria Esp.-Kongreso.

Urbo kaj Abatejo Klosterneuburg.

Kie la deklivoj de Wienerwald (arbaro) malsupreniĝas al fluejo de Danubo la prahistoriajn keltajn koloniojn anstataŭis dum roma epoko strategie gravaj fortikaĵoj, kiuj restis en konekto kun la granda garnizono Carnuntum (Petronell) kaj Comagene (Tulln) per strataro ĝis la tumultoj pro migrado de popoloj, invadoj de avaroj kaj maĝiaroj estis detruintaj preskaŭ ĉiujn postsignojn el ĉi tiu unua epoko kultura en nia regiono. Eble la municipo, nomata „Astura", preskaŭ precize situis, kie nuntempe Klosterneuburg, sur eta montdeklivo.

Babenbergano Leopold III a — nomata „milda limgrafo" — kaj kanonigita en 1485 — revivigis la preskaŭ malvivan kolonion en 1106 per konstruigo de preĝejeto, sur kies loko en 1114 oni konstruis la kolosan fondaĵon, kiu ĝis la nuntempo nomiĝas „Neuburg" (nova burgo). Vico da

fruktodoniga kulturlaboro ekeliĝis de ĉi tiu super la najbaran landon; baldaŭ la monaĥejo, ĉirkaŭ kiu multnombraj marŝantaroj el bajuvara gento ekkoloniiĝis, estis centro de materia kaj spirita kulturoj kaj tia ankaŭ restis dum longa tempo, kiam najbara Wien jam estis fariĝinta fokuso de la lando. Kun la florado de l' monaĥejo la urbo same estis ligata kiel en siaj malbonaj tempoj. Al „malnova abatejo“ oni konstruis en la 18-a jc. belegan „Neustift“ (nova abatejo) en baroka stilo; fakte nur staras la kvarona parto de l' „Escorial-simila“ projekto de Allio, sur kies ĉefkupolo paradas la grandiosa imitaĵo de rom-germana krono imperiestra, dum la pli malgranda orienta kupolo reprezentas la aŭstrian arĉidukĉapelon. La bildo de la komunumo Klosterneuburg, urbigita en 1298, pro malkonstruo de interesaj konstruaĵo, ekz. „Wienertor“ (pordego), bedaŭrinde perdis sian karakterizan aspekton, sed tamen bone efektas sekve de sia pitoreska situo, kaŭzita per la diverseco de l' tereno, kiun oni povas plej bone superrigardi de proksima Buchberg aŭ tiel nomata „Käferkreuz“.

Al la vidindaĵoj de l' monaĥejo de la aŭgustenaj kanonikoj apartenas unuavice la preĝejo, peristilo kaj fame konata Verdun-a Emajlverko en Leopoldkripto, plue la riĉenhava biblioteko, la „imperiestraj“ ĉambroj, marmora kaj giganta salonegoj, muzeo kaj la arkitekture efika „Kuchelhof“ (korto) kun gotika fenestra balkono.

La urbo, kies St. Martins-preĝejon oni taksas el la tempo de Karlo Granda, enhavas krome kelkajn antikvajn patriciajn domojn, multajn publikajn konstruaĵojn ktp. En Kierling- kaj Weidling-riveretvaloj same kiel sur la deklivoj de Kahlengebirge (montaro) kaj Leopold-monto situas vilaaro.

La tombejon ornamas aparta juvelo — „Pieta“ —, kiun kelkaj atribuas al Mathias Steinl, aliaj al Raffael Donner.

Klosterneuburg estas naskiĝloko de l' fama I. C. Albrechtsberger, instruisto de L. v. Beethoven. Ankaŭ Knebelsberger, komponisto de „Andreas Hofer-kanto“, naskiĝis ĉi tie.

Prof. d-ro V. O. Ludwig-Klosterneuburg.

* * *

Der Kongreß steht unter dem Ehrenschutze der Herren:

Landeshauptmann Dr. Karl Buresch, Minister a. D. Bürgermeister von Baden Josef Kollmann, Vizebürgermeister von Baden Alois Brusatti, Bürgermeister von Klosternenburg Kommerzialrat Jos. Schömer und Bürgermeister von Korneuburg Abgeordneter Ferd. Kottek.

Tagungsordnung:

Samstag, 26. Mai: 19 h Begrüßungsabend bei der „Schönen Sklavin“, Prater, Venedigerau, gegenüber dem Lustspieltheatergebäude (Trambahnhaltestelle);

Sonntag, 27. Mai: 7 h 20 ab Station Meidling (Südbahn) gemeinsame Abfahrt nach Baden; Empfang in Baden Bahnhof;
- 8 h 30 Gottesdienst in der Hofkirche (Frauengasse) mit Predigt (in Esperanto), veranstaltet vom Kath. Esp.-Bund;
- 9 h 30 feierliche Eröffnung der Tagung im Kurhaussaale im Kurpark in Baden;
- 11 h Konzert im Kurpark;
- 12 h 30 gemeinsames Mittagmahl;
- 14 h 30 gemeinsame Besichtigung des berühmten Strandbades;
- 15 h 30 Abmarsch zum Café Legenstein im Helenental, dort Arbeitssitzung;
- 19 h Abmarsch zum „Heurigen“ (humorist. Vorträge Oberlehrer Cipl-Leopoldsdorf und anderes);

Montag, 28. Mai: 8 h ab Wien Nordbahn gemeinsame Fahrt nach Korneuburg;
- 8 h 45 Begrüßung vor dem Rathaus in Korneuburg durch den Bürgermeister Landtags-Abgeordneten Kottek;
- 9 h Arbeitssitzung im Restaurant Forster, gegenüber dem Bahnhofe;

12 h gemeinsames Mittagessen in der gleichen Gaststätte;
13 h Abmarsch zur Fliegenden Brücke, Überfahrt nach Klosterneuburg, Marsch zum Rathause;
14 h 30 Begrüßung durch Bürgermeister Kommerzialrat Josef Schömer;
15 h Besichtigung des sehenswerten Stiftes Klosterneuburg mit den Kaiserzimmern.

Besuch des Stiftskellers und des Strandbades. Rückfahrt nach Wien.

Informoj:

Veturado al Baden kaj reen Ŝ. 2.80; tagmanĝo Ŝ. 2.—, la kartoj estos vendataj dum la veturado en la trajno; koncerto kaj eniro en bordbanejon senpage; kiu ne volas partopreni la laborkunsidon, povas sin bani; bankarto aparte rabatita; al „Heurigen bonvolu kunporti manĝaĵon, ĉar tie vi povas aĉeti nur vinon; samideanoj, kiuj volas amuzi la kongresanojn, bonvolu anonci sin kaj ludi, kanti aŭ deklami ĉe „Heurigen"; veturado de Wien al Korneuburg Ŝ. 1.10; kiuj ne volas partopreni la laborkunsidon, povas rigardi „Kreuzenstein", 3/4 hora migrado tien, enirprezo Ŝ. 1.—; tagmanĝo Ŝ. 2.— (kiel en Baden supo, rostaĵo kun aldono kaj farunaĵo), karton vi devas aĉeti antaŭ la laborkunsido; „Fliegende Brücke" 20 gr.; vizito de l' abatejo aparte rabatita (anst. Ŝ. 1.—) 30 gr.; reveturo al Wien 60 gr.

Aliurbanoj loĝu en Wien, en Baden loĝejo ne havebla.

El Bratislava venos 30 samideanoj al nia VIII-a.

Nialandaj s-anoj **tuj aliĝu.**

LKK.: Prez. Pronaj, Baden, Bahng. 2.

Kongresoj en Majo.

Brita—Newcastle 27./28. Tutĉeĥoslovaka—Teplitz 26./28. Dana—Odensee 27. Franca—Lyon 27. Germana—Potsdam 27. Tutpollanda—Krakow 27./28.



Adreso: Kleine Hondstr. 11.

Lia reĝa moŝto **Alberto,** Reĝo de la Belgoj, akceptis la Altan Protektantecon de la kongreso.

LKK. decidis organizi prezentadon de „Hamleto", tragedion en kvin aktoj de W. Shakespeare, tradukita de d-ro L. L. Zamenhof.

Belga vizo ne bezona por tiuj, kiuj povas montri ĉe la limo provizoran kongreskarton. Ili ankaŭ ricevos 35% rabaton sur la belgaj fervojoj.

Pli ol 500 personoj ĝis nun aliĝis, el kiuj „Heroldo" ĝis nun publikigis la adresojn de 375.

Plifaciligu la laboron al LKK. per tuja alsendo de via aliĝilo kun mono (35 Ŝ.). El nia lando nur 2 personoj ĝis nun aniĝis.

Do rapidu kaj reprezentu Aŭstrion multnombre dum la XX-a.

Postkongresaj vizitoj al Nürnberg dum Dürerjaro 1928. La esp.-istaro de Nürnberg invitas la kongresanojn, viziti post la XXa la urbon de la XVa. Nedevigajn aliĝojn kun proksimuma dato de la alveno oni sendu al s-ro Otto Pilhofer, Nürnberg 19. Se sufiĉaj aliĝoj estos, specialaj aranĝoj okazos. Ciuj esp.-istoj traveturantaj Nürnberg-on, bonvolu dum sia restado en la urbo telefone interrilati sin kun n-ro 53740.

„Pressa" en Köln.

„Pressa", internacia ekspozicio pri gazetaro, okazos de majo ĝis oktobro en Köln am Rhein. Loka komitato intencis starigi Esperanto-kioskon antaŭ la „Domo de la Nacioj". Sed la alveninta financa helpo flanke de la tutmonda esp.-istaro ne sufiĉis por starigi konvenan kioskon. La komitato pro tio nur povas propagandi je tiu

grava okazo jene, ke ĝi elmetos nian gazetaron en la granda legoĉambro kaj disdonos propagandilojn en diversaj lingvoj. Subtenu per mono, propagandiloj kaj rajtigiloj, por anstataŭi vin en la plej diversaj kongresoj. Adreso: H. J. Hoen, sekretario de l' Esp.-kartelo, Unter Goldschmied 17, Köln a. Rh.

„Baltlanda Kongreso“ estas projektata por 1929, kiu pli firme interligu la samideanojn el Finnlando, Latvujo, Litovujo kaj Estonujo. Grigorjev.

Renkonto de E.-fervojistoj okazos pentekoste (27.-29. 5.) en Torino (Italujo). Aliĝojn kaj informpetojn sendu al „Esperanto“, Casella Postale 166, Torino.

Mezeŭropa Esperanto-Konferenco.

5.—7. majo 1928.

Telegramstile: La 5. V. mi alvenis matene je la 6., akcepto en la stacidomo (s-ro Kovacs); ½11 alveno de la jugoslavaj s-anoj; promenado; vizito de foiro kun Esp.-stando; koncerto en blindulejo (alparolo de blinda s-ano d-ro Bany; dankvortoj de malnova pioniro d-ro Lorand). Tie ĉeestis fraŭlineto ĉarma, Tolnay Agi (naskita 19. majo 1923), kiu bonege parolis kun mi en Esp. Vespere antaŭkonterenco inter la gvidantoj de la landaj societoj kaj la prepara komitato de la XXI-a Kongreso kaj ĝies antaŭkongreso ĝis meznokto. Prezidis d-ro Patai. 6. V. Promenado al Placo de Libereco. Festkunsido de la konferenco kun jarkunveno de Hungarlanda E.-Societo en Hungara Komerca Halo. Prezidis D-ro Lorand. Salutparolis Steiner kaj d-ro Maruzzi-Zagreb. Prez. Tieder kaj vicprez. de Hungara Laborista Ligo Esp. (26 grupoj, 1600 membroj) promesis subteni kaj kunlabori por inde sukcesigi la XXI-an. Akcepto de la decidoj faritaj dum la antaŭkonferenco. Promenado kaj amuzo.

Detaloj sekvos. Mi kore dankas al la aranĝintoj kaj al la tre afablaj kaj helpemaj gesamideanoj d-ro Patai, d-ro Lorand, prof. Mihalik (afergvidanto de la Hungarlanda E.-Societo), prof. Kökenji, Balkanyi, Baghy, ge-Tolnay ktp. (Ĉiujn nomojn mi bedaŭrinde ne rememoras). Ni bone loĝis en Hotel Continental, entrepreno de UEA. Steiner.

Sentenco de J. A. Comenius.

1592—1670.

Forte staras nia deziro, ke oni elektu unu lingvon, per kiu ĉiuj nacioj komune parolu, . . . kiu estu pli facila ol ĉiuj lingvoj konataj, por ke oni povu ĝin ellerni sen perdo de la tempo kaj objektoj.

Wien en Schubert-jaro 1928.

Kion oni aŭdos kaj vidos. Programego.

„Ĉi tiu jaro estu inda honorigo de l' memoro al la plej eminenta Wien-ano — — Schubert“ diris dir. Kronfeld en sia bonega parolado pri Schubert-jaro en la gazetarkonferenco. El ĉi tiu parolado ni citu la ĉefajn punktojn.

De l' 26. majo ĝis fino de l' jaro la fremdulo havos okazon kunfesti Schubert en Wien.

La 26. majo antaŭ „Konvikt“ (kunevivejo) sur Universitata Placo, en kiu Schubert studadis kiel muziklernanto kaj verkis siajn unuajn komponaĵojn, muziklernantoj prezentos Okteton kaj du dekantaĵojn el sia Okteto por blovinstrumentoj.

3. junio malfermo de „Festsemajno en Wien kaj Niederösterreich“. „Wienaj Philharmoniker“ ludos sub direktado de operejdirektoro Schalk sur urbdoma placo C-dur simfonion, la plej eminentan simfonian verkon de la plej populara klasikulo. Antaŭe de l' urbdoma turo Schubert-fest-fanfaro, komponita de Joseph Marx.

Dum 5 vesperoj okazos en la naskiĝdomo de l' majstro (Nussdorferstrato) prezentadoj de Schubert-aj kantoj de l' balkono (Gottesmann-kvarteto kaj la famaj kantistoj Rosette Anday, Margit Angerer, Hans Duhan kaj Franz Steiner), dum la aŭdantaro estos en la korto, kie Schubert ludis estinte infano.

La 6. kaj 14. junio oni okazigos sur Josefsplatz serenad-koncertojn de „Philharmoniker“ kaj kantistaro el la operejo kaj vico da solkantistoj. La unuan direktados Schalk, la duan Paumgartner, direktoro de „Salzburg-a Mozarteum“.

Kiel kreinto de germana kanto kaj de klasika Wien-a dancmuziko oni festos Schubert.

9. junio sur ĉiuj placoj en ciuj distriktoj de Wien estos prezentadoj de „Ostmärkischer Sängerbund“ kaj „Landorganizo de Laboristaj Kantistunuiĝoj“. Vespere la urbdomo ekbrilos

en festa iluminado. Sur la placo antaŭ ĝi 4000 kantistoj kantos.

17. novembro ovacio antaŭ Schubert-monumento en Stadtpark. Vespere festprezentado de Schubert-muziko en la urbdomo mem.

18. novembro Wien-aj lernejinfanoj ovacios antaŭ la naskiĝdomo, kie Schubert pasigis sian infantempon, per kantado de Schubert-ĥoroj. Poste inaŭguro de Schubert-fonto — ĉe angulo de Liechtenstein- kaj Alserbachstratoj —, kiun iniciatis „Schubertbund".

Dum antaŭvespero al la mortotago la urbdomo estos denove feste iluminata kaj de sub la turo eksonos „Schubert-aj melodioj".

19. novembro — mortotago de l' majstro — ovacio ĉe la tombo. Urbestro de Wien metos florkronaĵon sur la tombon; ĥoroj de Wien-aj virinoj kaj fraŭlinoj kantos. Dum la horo de l' morto 3a h. pttgm. — „Wiener Schubertbund" kantos en la ĉambro, kie Schubert mortis, funebrajn kantojn; „Wiener Männergesangsverein" kunkantos. Post ĉi tiu soleno la partoprenantoj iros en solena procesio al Josef-preĝejo en Schönbrunnerstrato, kie okazis la konsekro de la mortinto kaj kie Schubertbund nun aranĝos muzikan solenon. Tiel oni simbole ripetos post 100 jaroj la lastan vojon, sur kiu Schubert estis akompanata de siaj amikoj.

Urbo Wien dum la tuta jaro ornamos Schubert-domon per freŝaj floroj.

Radio-stacio Wien ensonorigis Schubert-jaron per Schubert-sonorilo kaj la registaro finigos ĝin per jenaj aranĝoj: 17. novembro akcepto ĉe prezidanto de la respubliko; 18. novembro soleno en „Grosser Konzerthaussaal"; 19. novembro festprezentado en Universitato; 22. novembro festprezentado en „Staatsoper" (operejo); 25. novembro akcepto ĉe ministro por instruaferoj.

„Fremdenverkehrskommission" Wien, VII., Messepalast eldonis libreton ilustritan kun kalendaro pri ĉiuj aranĝoj. Tiel Wien fariĝos en 1928 por la tuta mondo vera Schubert-jaro!

Pri Schubert-Centjarekspozicio raportis dir. de la urbaj muzeoj Hermann Reuther:

Al la artaj prezentadoj de urbo Wien aliĝas kiel scienca Schubert-jarcentekspozicio, kiu okazos en la ĉambregoj de foirpalaco.

La urbaj muzeoj, kiuj transprenis la taskon inde aranĝi la ekspozicion, reprezentas kun sia riĉenhava kolekto de muzikmanuskriptoj kaj leteroj de Schubert kaj rememoraĵoj al la majstro sendube la plej eminentan nuntempan Schubert-arkivon.

Tamen memkompreneble ni bezonas objektojn, kiuj multnombre troviĝas en publika kaj privata posedoj kaj ni petas la posedantojn, ke ili afable pruntedonu ilin por celoj de la ekspozicio. Komonumo Wien garantios, ke vi certe rericevos viajn objektojn valorajn en la sama stato kiel vi ilin pruntedonis. Skribu pro tio al Messepalast Wien VII. La ekspozicio montru ne nur la vivon kaj verkadon de Schubert, sed ankaŭ Wienan belarton en la vivtempo de Schubert.

AED. oder ÖEB.?

Der E.-Verein f. Stmk. dankt allen Vereinen und Einzelesperantisten, die durch Zuschriften ihre prinzipielle Stellungnahme (mit 1 Ausnahme alle bejahend) bekanntgegeben haben. Leider ist es infolge der vorgerückten Zeit nicht mehr möglich, auf alle Einzelheiten einzugehen und die eingelangten Schreiben einzeln zu beantworten. In den nächsten Tagen ergeht an alle österr. Gruppen ein zweites Rundschreiben mit dem an den Kongreß gerichteten Antrage. Der E.-Verein f. Stmk. ersucht die Delegierten, dieses zweite Rundschreiben verläßlich zu der in Baden am 27. Mai um 11 Uhr vormittags stattfindenden Besprechung der Provinzgruppen (Ort wird spätestens in Baden bekanntgegeben) mitzubringen.

F. d. E.-Verein f. Stmk.

K. Hackl, Vorsitzender. W. Rogler, Schriftführer.

S-ro Grenkamp parolis en Paris en Societo de Pilsudski kaj en Societo de Sokol pri „Problemo de Lingvo Internacia". Mondkonata ĵurnalo „Pax" decidis je iniciato de s-ano Grenkamp aperigi serion da priesperantaj artikoloj.

Nova Intern. Asocio.

Diverslandaj konatuloj fondis internacian asocion kaj organizas kongreson okazontan en Kopenhago la 1. julio 1928 (angle, france, germane kaj Esp.-lingve). La celo estas, studi demandojn pri edzecleĝoj, pozicio de la virino en homa societo, naskoj, eŭgeniko, protekto al senedzaj patrinoj, batalado kontraŭ prostitucio kaj seksaj malsanoj, kondiĉoj de edziĝo ktp.

La fondintoj de la asocio: Auguste Forel, Yvorne; Havelock Ellis, London; Magnus Hirschfeld, Berlin; Margaret Sanger, New York; Victor Marguerite, Paris; Aldo Mieli, Roma; Rudolf Goldscheid, Wien; Dr. Bondy, Praha; Prof. Herm. Lundborg, Upsala; Pasche-Oserski, Kiew; Asnaurow-Humahnaca, Argentino; Dr. Prissmann, Riga; Dr. Norman Haire, London; Dr. Rohleder, Leipzig; Prof. William Robinson, Paris; Else Jerusalem, Buenos Aires; Prof. Dührssen, Berlin; Dr. Batkis, Moskva; Dr. Benjamin, New York; Dr. K. Kautsky, Wien; Merrit Hawkes, Birmingham. Informojn donas E.-lingve s-ro J. H. Leumbach, Stockholmsgade 39, Laege, Kopenhago.

Interŝanĝo de junuloj.

Grupo da madridaj samideanoj celas interŝanĝon de junuloj de 10—15 jaroj tiamaniere, ke alvenos al Hispanujo fremda junulo por loĝi unu aŭ du jarojn en la hejmo de la gepatroj de hispana junulo, kiu iros dum la sama tempo al la hejmo de la fremda junulo. Tiel la koncernaj familioj ne perdas, sed nur ŝanĝas la filon, kiu havos la okazon lerni en la alia lando la lingvon kaj perfektiĝi en ĝi.
Interesuloj sin turnu al s-ro Benigno de Luna Gomez, strato Abascal, n-ro 45—1, Madrid.

La junulojn alilanden!

Hungara Fremdulafera Studentkomisiono (H. F. S.), ĉefa reprezentanto de hungara studentaro peras interŝanĝon de junuloj dum julio kaj aŭgusto.
Ili sendis al ni 5 adresojn de ŝanĝpretaj gepatroj.
Informojn ni donas kontraŭ alsendo de respondafranko. AED.

Atentu!

Por iom helpi pro la terura tertremo en mia patrujo mi sendos po unu ekz. de ilustr. „Bulgara Antologio" (vidu la bonegan recenzon en n-ro 11 et 27 de AE.-red.) kun 250 paĝoj al ĉiu, kiu anoncos al mi, ke li forsendis almenaŭ sv. fr. 2.50 (plena prezo estas sv. fr. 5) al la Bulgara Ministerio de Internaj Aferoj aŭ Ruĝa Kruco en Sofio. I. H. Krestanoff, 2 rue de Fossès St. Jacques, Paris 5.

Kondolencon

mi esprimas al mia kara samideano Morariu pro la morto de lia frato Konstanteno. Steiner.

*

Mi forgesis danki al „Virina Sekcio" pro la bela florkrono por mia kara edzo. Bonvolu nun akcepti plej koran dankon! Valerie Zwach.

Alvoko.

Terura tertremo okazis en Bulgarujo. Multnombraj estas la suferuloj. Ni montru al la mondo, ke la „interna ideo" ne nur estas sur la papero, sed en nia koro kaj malfermu niajn — certe ne tro plenigitajn — monujojn, por helpi laŭ niaj povoj.
Ĉiu donu sian donaceton sur la altaron de l' helpemo al kunhomo!
Sendu la monon en poŝtmarkoj kaj monbiletoj al la redakcio de „Aŭstria Esperantisto", kiu publikigos la nomojn de la donacintoj kaj sendos la monon al la bulgaraj samideanoj!
Duoble donas, kiu rapide donas!
Do donu rapide kaj duoble!

Steiner, prez. de AED.

Atentu!

Ĉiu grupo rajtas sendi delegitojn, nome por 1—20 membroj (1), 21—50 (2), 51—100 (3), al la laborkunsidoj de l' kongreso.
Unu delegito nur rajtas reprezenti 3 delegitrajtojn.
La delegito alportu rajtigilon, subskribitan de l' prez. kaj sekr. kun stampilo de la grupo.
Proponojn alportu duobligite kaj transdonu ilin tuj al la prez. de AED.
Venu multnombre al la kongreso, ankaŭ nedelegitoj. AED.: Steiner, prez.

EDW. en sia 74-a kunsido (28. 4.) decidis, malaprobi la organizan proponon de E.-Soc. p. Stirio kaj rekomendis la aldonproponojn por AED. de E.-Soc. „Danubio". La 19. 5. okazos eksterordinara kunsido je la 19 h en Nova Komercakademio, VIII., Hamerlingpl.

Esperanto-Akademio okazos la 6. VI. je la 19 h 30 en Josefsaal, VIII., Josefsgasse. Vi kore estas invitataj.

Aŭstria Pacifista E. Societo.

Ovacio al nia Majstro.

EDW. aranĝis la 15. 4. attagm. ovacion antaŭ la memortabulo ĉe hotelo Hammerand. Parolis germane s-ro Schade, esp.-e s-roj Werner kaj Frey.

Die staatlichen Esperantoprüfungen.

Zum Frühjahrstermin 1928 (10. bis 12. April) waren erschienen: 14 für die Lehrbefähigungsprüfung; davon trat 1 während der Prüfung zurück, 5 legten sie mit Auszeichnung ab; 9 für die Kenntnisprüfung; davon bestanden die Prüfung 3 mit Auszeichnung.

Aufgaben f. d. Lehrbefähigungsprüfung. Übersetzung aus dem Esperanto: Fund. Krestomatio p. 274—276, Ĉu lingvo internacia estas bezona? Aufsatz (zur Wahl): 1. Zamenhofaj pensoj pri la estonteco de la lingvo Esperanto. 2. Signifo de la kreota Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. 3. Miaj spertoj dum la lernado kaj instruado de la lingvo Esperanto. Übersetzung ins Esperanto: Aus Goethes „Wahrheit und Dichtung", I. Teil, 3. Buch, 3. Absatz.

Allg. Pädagogik: Die Aufmerksamkeit und ihre Bedeutung für den Unterricht.

Methodik des Sprachunterrichtes: Die schriftlichen Übungen im neusprachlichen Unterrichte.

Aufgaben für die Kenntnisprüfung: Übersetzung aus dem Esperanto. Aus Paul Bennemann. Tra la mondo II, ĉap. 4, p. 131: Lerta komercisto. Aufsatz (zur Wahl): 1. Esperanto en la servo de kulturaj movadoj. 2. Esperanto kaj la trafikaj rimedoj (Fervojo, poŝto, telegrafo, telefono, Radio, aerveturado). 3. Priskribo de vojaĝo.

E.-Societo por Stirio, loka gr. Graz. La penadoj de nia membro s-ro K. Bartel, UEA. del. de Graz, pro eldono de gvidfolio tra Graz prosperas. La urbkomunumo eldonos ĝin kune kun la Graza foiro en germana kaj esperanta lingvoj. Denove ni petas ĉiujn eksterlandajn gesamideanojn, ke ili helpu tiurilate per multnombroj demandoj al: „Stadtrat Graz" (urbkomunumo) aŭ „Landesverband für Fremdenverkehr" (landa societo por fremdultrafiko), ĉu okaze de la ĉijara 800 jara urbjubileo prospektoj aŭ gvidfolioj esperantlingvaj estas haveblaj. La lastan ŝtatan ekzamenon pri instrukapableco 10.—12. IV. partoprenis 4 membroj: Rogler, Hackl, Horneck (Graz), Schöpfer (Voitsberg). Ĉiuj bone sukcesis, 1 kun distingo, Ĝis nun absolvis la eksamenon pri instrukapableco 8 membroj de nia societo. Ĉiuj bone sukcesis, 4 kun distingo. Lau metio ili estas: 1 mezlerneja instruisto, 3 oficistoj, 2 burĝlernejaj instruistoj, 1 komerclerneja direktoro, 1 oficiro.

Krems: S-ro Friedrich Paumgarten, membro de nia grupo, mortis la 16. marto post longa malsano. Li ripozu en paco.

Wien: „Danubio": 30. 4. lumbildpar. Ĉech „12 jarojn esp.-isto"; 7. 5. E. Werner „Lingvaj demandoj"; 14. 5. f-ino Thea Kohn „Samoa", lumb. par.; 21. 5. Prez. Ĉech „La nuna stato de la aŭstria E.-movado". — **„Unua E.-Unuiĝo":** 24. 4. prelego de d-ro Sós. — 8. V. Parolado f-ino Schweitzer „Mia libertempo en Alĝerio". — **„E.-Org. de oficharv.":** 2. V. ĝeneralkunveno; 12. V. Schubertfesto. Detaloj en junia numero.

Esp.-Gottesdienst in Wien:
20. Mai. 10 Uhr, I. Minoritenkirche.

Rimarkindaj Presaĵoj.

Paul Knepler (Wallishaussersche Buchhdg.):

Poeziaĵoj de F. Schiller, trad. de kolonelo Zwach, ĵus aperis en dua eldono. Prezo Ŝ 1.20.

Ellersiek & Borel-Berlin:

Bona sinjorino. Novelo de E. Orzesko, tradukis el la pola Kabe. 2. eldono. E. B. I. No. 3. 40 pf.

La aŭtorino delikatsenta, jam bone konata al ni esperantistoj i. a. per Zamenhofa traduko de l' romano Marta, rakontas en tiu novelo pri seninfana riĉulino, kiu intencante plenigi sian enuan vivadon per bonfarado, adoptas mizeran knabinon, edukas, lernigas, amuzas ŝin, sed iom post iom uzante ŝin kiel ludilon, luksan amuzaĵon, fierigas la fraŭlinon, mem fremdiĝas pli kaj pli de ŝi, eĉ malŝatas kaj fine forpuŝas la dorlotitan, kiun komence ŝi volis levi al pli bona socia stato. Modela traduko de Kabe. D-ro Blaas.

„Esperantista Voĉo", Jaslo (Pollando):

Krioj de l' koro. Salo Grenkamp-Kornfeld. Prezo: 0·25 sv. Fr.

Poemareto de l' nuna pola Esperanto-poeto. La rekomendo de l' „Esperantista Literatura

Asocio" garantias puran, neriproĉindan lingvon. Temas pri amo, amikeco, malŝato al milito, pacemo kaj naturo. Kelkaj poezietoj ŝajnas ververe elflui el koro profunda. La aŭtoro dediĉis la verketon al sia amiko Paŭlo de Medem — dediĉo, nun jam melankolia pro la posta morto de tiu modelo. D-ro Blaas.

Katolika Espero-Paris:

Fabiola, romano pri la katakomboj de Kardinalo Wiseman, el angla lingvo tradukita de Rano, dua eldono reviziita de Em. Robertt 15×20 cm, 440 paĝoj, 6 luksaj ekster- kaj multaj entekstaj ilustraĵoj. Prezo, afrankite: 35 fr. fr. „Espero Katolika", 55 rue de Vaugirard, Paris-VI.

Heroldo de Esperanto-Horrem:

Ilustrita Biblioteko. Unua serio. N-roj 1—5. Unuopaj numeroj Mk. 0·50. Tuta serio Mk. 2·—. Ĉiu broŝuro entenas unu bildon kaj ĉarmajn desegnaĵojn sur la kovrilo. Per ĉi tiuj broŝuroj liveras la fervora eldonejo speciale al ni eŭropanoj ekzotajn fruktojn de la fremdlanda literaturo. Ne estas necese diri, ke en ĉiuj libroj la esperanta stilo estas perfekta.

Devi Angreni kaj Mak Miah (I. B. n-roj 1/2), du rakontoj el Javo, originale en Esperanto de P. W. van den Broek. La unua rakontas al ni interesan okazintaĵon el la javana historio. Ĝi montras la kredon de l' indiĝenoj al la fatalo (karma) kaj la obeemon al la altranguloj. Princo Panĝi, filo de reĝo Ĝengolo, edzinigu laŭ intenco de la patro la filinon de reĝo Kediri. Sed li enamiĝas en la ĉarman filinon Angreni de la veziro kaj edzinigas ŝin. Pro ĉi tiu malobeo kaj peko kontraŭ la moroj Angreni devas fariĝi viktimo de superstiĉaj geparencoj, kiu ŝin mortigas. La princo, ofendita per ĉi tiu kruela tiraneco, forlasas sian patron kaj regnon kaj edzinigas alian princinon.

En la dua Mak Miah, la javanino, edzinigita de angla rizplantisto kaj vivanta kun li en bela familia harmonio kaj feliĉo, forlasas pro kredo al „karma" sian edzon kaj filinon kaj fariĝas viktimo de ruzega fripono. Ambaŭ rakontoj estas tre legindaj.

Ribelemaj virinoj (Uan Caŭ Ĉin). (I. B. n-ro 3.) Moderna ĥina dramo en du aktoj, de M. Ĉ. Kuo. Trad. Ŝ. M. Chun. Ĝi estas karakteriza verko de moderna ĥina verkisto. La fantazia temo bazas tamen sur historio kaj volas montri, kiel ankaŭ ĥinaj virinoj scias ribeli kontraŭ pseŭdomoralo de viroj.

Sakuntala. (I. B. n-ro 4.) Rakonto el la antikva Hindujo laŭ la konata dramo de la fama hinda poeto Kalidasa. Sakuntala estas la filino de l' pia eremito Kauva. Reĝo Duŝjanta venas okaze de ĉasado en la ermitejon de virinoj, renkontas tie la ĉarman knabinon, ekamas kaj edzinigas ŝin. Sed kiam ŝi sin sentas patrino, pro iu malbeno li ŝin ne plu rekonas kaj S. devas vivi en malfeliĉo kaj mizero. La retrovo de perdiĝinta juvelo, kiun la reĝo siatempe donis al S., gvidas al reekkono kaj unuiĝo de la geedzoj. La enhavo de la dramo estas en formo de rerakonto tre bone redonita.

Mil kaj Unu noktoj (I. B. n-ro 5). Kelkaj rakontoj el la mondfama araba kolekto rerakontitaj en E. Kiu ne konas ilin, la belegajn kaj fantaziplenajn rakontojn de mil kaj unu noktoj, al kiuj Ŝerezade dankis la savon de sia vivo kaj la edziniĝon al la reĝo Ŝarair? La kolekto de ĉi tiuj orientaj fabeloj kaj rakontoj originas en Hindujo kaj transiris poste en la egiptan kaj araban literaturon. Ĉi tiu kajero entenas la legendon pri Ŝerezade kaj du fabelojn. Ni ĝojas, ke la eldonejo promesas publikigi ankaŭ aliajn.

Ĝenerale ni diru ke „Ilustrita Biblioteko" donas al ni tre interesajn kaj bonstilajn legaĵojn en distinga kaj tamen malaltpreza eksteraĵo. D-ro Sós.

Tri societaj ludoj por grupoj:

1. **Litera ludo** (por lude lerni vortojn). Prezo Rm. 1.60 (sv. fk. 2.—).
2. **Proverba kvartetludo** (ellaboris s-ano Schuhler). Prezo Rm. 1.60 (sv. fk. 2.—).
3. **Rido sen fino** (ellaboris Teo Jung). Gajiga demanda kaj responda ludo, por lude lerni konversacii, precipe la tabelvortojn. (50 demandoj kaj 500 respondoj.) Prezo Rm. 2.— (sv. fk. 2.50).

Rud. Mosse-Berlin:

Esperanto, Vollständiger Lehrgang mit Wörterbuch, de d-ro Ernst Kliemke, prezo Rm. 1·50.

Jam konata estas al legantoj de E. B. I. (Nr. 27) la novelo de l' sviso Ernst Zahn „La patrino", kiu artisme rakontas suferadon de patrino amanta sian filon, en fremlando morale degenerintan. Ĝin la prezidanto de l' Germana Esperanto-Asocio bonege kaj modernstile retradukis kaj en multaj detaloj superas la antaŭan tradukon de Schmid. La 119 paĝa libro ne estas sistema gramatiko, sed gvidas atenteman leganton tra la teksto de tiu novelo, pli kaj pli interesa, per instrua, tamen plaĉa komentario, iom post iom ampleksas ĉiujn regulojn de la gramatiko kaj sintakso, ekzemplas, se necese, per aliaj frazoj, tiamaniere neniam pedante obstinas, sed ĝuste psikologie penetras en la idearon de l' lernanto, lin ĉiel instigante, ekpensi la diferencon inter lingvoj gepatra kaj lernata. Personojn, precizemajn speciale logos tia lernilo. En aldono li povos legi frazareton de l' ĉiutaga vivo, proverbojn, sisteman resumon gramatikan kaj la dek E.-tezojn de la verkinto, kiuj pro sia koncizeco plej trafa jam estas troveblaj en aliaj E.-broŝuroj. Eble adepto lingve jam iom progresinta profitos eĉ pli ol komencanto el tiu libro, ĉar ĝi enhavas lingvajn interesaĵojn, pli komprene ŝateblajn de tiu, ol de novulo.

Mi do rekomendas ĝin precipe por perfektiĝemuloj. D-ro Blaas.

A. Paolet, S. Vito al Tagliamento:

Nova katalogo n-ro 3 pri E.-eldonaĵoj de ĉi tiu granda eldonejo ĵus aperis.

Aliaj:

Enkondukilo en la fundamentajn regulojn de la mondlingvo Esperanto. Eld. la red. de „Esperanto-Junularo“, A. Neupert, Leipzig N 23 Wedellstr. 17. 24 pĝ., prezo: por 2 ekzempl. 1 resp. kupono.

Per tiu ĉi instrua broŝureto la lernanto de nia lingvo divenas per simplaj ekzemploj la ĉefajn regulojn de l' E.-gramatiko kaj notas ilin nacilingve sur aparta libera paĝo apud la E.-teksto.

Danco de Skeletoj. Fonto de Sudroj. Nokto ĉe Landlimo. Eld. Japana E.-Instituto, Tokio, 1927. 76 pĝ. 11·15 cm.

Ĉi tiujn tri dramojn originale verkis en japana lingvo fervora samideano Ujaka Akita kaj trad. Haĵime Suzui kaj Kaname Susuki.

Du kokcineloj, La montro, de Géza Gárdony. Tradukis d-ro Kolomano de Kalocsay. Budapest 1923. Broŝureto 30 paĝa, prz. Rm. —·30. Du ĉarmaj noveletoj el la vivo de hungarlandaj vilaĝanoj. D-ro Sós.

Laborĉarto de la itala popolo. Verona E.-Asocio iniciatis la eldonadon de ĉi tiu dokumento, kiu estas dissendita al la del. de UEA. Sendante resp. kuponon de UEA, vi povas havigi al vi ekzempleron. Adr.: Associazione Esperantista Veronese, Via G. Memeli 2, Verona.

Meßamt (E.-fako), Frankfurt a. M. eldonis okaze de sia printempa foiro belan, ilustritan prospekton en E.

La raporto de l' prez. d-ro Blassberg-Kraków dum la kunsido de TEKA en Danzig la 1. aŭg. pj. aperis broŝurforme. Mendu ĉe Red. de Int. Medic. Revuo, Lille, Francujo, Rue de la Bassée 31.

„Inter Ni“, oficiala organo de „Interniaro“ kaj Esp.-Kolportista Asocio. Red. Livingstone Jenkins, 64 St. Thomas Rd., London N. 4. 16 pĝ. Jarabono: Rm. 1·—.

Vizitkart-enigmo
de K. Haager.

Otto Kroer

Delhi

Nomu la profesion de tiu sinjoro!

La solvintoj de la enigmo sendu la solvon al ni. Ni publikigos la nomojn kaj sendos al tri ellotumitaj premiojn en formo de E.-libretoj.

Pollando kaj Gdansk. Ilustrita gvidlibro tra Pollando kaj Libera Urbo Danzig. Eld. de Pollanda E.-Delegitaro, Kraków. 1927. 128 paĝoj. Prezo ne montrita. Ricevebla de „Pola Esperantisto“, Kraków, Smolenska 9.

Ĉi tiu gvidlibro ne estas traduko, sed originale verkita en Esp. Luksa papero, bonega presado, multaj belaj bildoj. Certe necese por ĉiu samideano vojaĝanta en Pollando.

Rekomendindaj firmoj.

Bäckerei = bakejo: **Korneuburg.**
Karl Luegmayer (E), Albrechtstraße 3.
Gemischtwaren = Diversaĵoj:
Alois Cisař, Bisambergstr. 21.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Radetzkystr. 6/III, Vereinsheim (kunv.) „Pastete“, Sporg. 28, Do (ĵ) 20—23 h.

Leoben.

E.-Verein f. Steiermark: Cafe Weidbacher, Mi (me) 20—22 h.

Innsbruck.

Arbeiter-Esp.-Klub (Laborista klubo), Südtiroler Platz, Hotel Sonne, Do (ĵ) 20—22 h.

Esperanto-Klub, Gasthof „Grüner Baum“, Museumstraße. Mi (me) 20—22 h.

Wien.

Katolika Unuiĝo Esperantista en Wien, I., Freyung 6 (Pfarrkanzlei), Mi (me) 17—19 h.

I. Wiener Esp.-Verein, I., Schellinggasse 12, Kafejo Hofbauer, Di. (m) 19·30 h.

Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, III., Henslergasse 3, Hochparterre; Fr (v), 19–21 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, ĉiutage 17–19 h.

„Konkordo", IV., Margaretenstr. 38 (Kaffee Aŭstria) Do (ĵ) 20 h.

Viena Akademia Unuiĝo Esp., VII., Neubaugasse 25, Café Elsahof, Mo (l) 19–22 h.

Esp.-societo „Danubio", VII., Neubaugasse 25, Café Elsahot, Mo (l) 19–23 h.

Esp.-Bildungsverein „Supren", VII., Kaiserstraße 121, Café, Fr (v) 18–21 h.

Esp.-societo „Fideleco", Währinger Bürger café, XVIII., Staudg. 1, Di (m) 16–19 h.

Bohema Klubo Esperantista, XV., Turnerg. 9, I. et., Narodni dum, Mi (me) 20 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Bisamberg 248.
Presejo: Gesellschafts-Buchdruckerei Brüder Hollinek, Wien III, Steingasse 25.